

Universitato Adam Mickiewicz (UAM) Poznan, Pollando

Januaro 2013

Mirejo Grosjean, Svislando

FAKO: SEMANTIKO, LEKSIKOLOGIO Profesoro: M. Farris

SIGNIFRILATAJ VASTEKOJ

**Ili malsamas de lingvo al lingvo.
Kiel konsideri ilin en la instruado?**

1. Enkonduko
2. Prezento de kelkaj kazoj
3. Malsamaj aspektoj en la prezentitaj kazoj
4. Pedagogiaj aspektoj
5. Konkludo
6. Bibliografio

Enkkonduko

Pri semantika kampo.

Kampo estas surfaco, ekstera surfaco el tero, kie vegetalaĵo povas kreski aŭ kie oni ion povas planti aŭ kie brutoj povas paŝti. Do surfaco, dudimensia aĵo.

Semantiko rilatas al signifo, semantiko traktas la signifon de la vortoj.

Semantika kampo estas aro da vortoj, kiuj rilatas al iu temo.

Mia laboraĵo pritraktos la vastecon, la precizan surfacon de la signifo de iu vorto.

Prezento de kelkaj kazoj

de : BEIN

Mi lernis la vorton « das Bein » en la lernejo eble en la aĝo de 13. Oni donis al mi la tradukon en mia lingvo : « la jambe ». Por mi la kruro etendiĝas de la ingveno ĝis la piedo kaj inkluzivas la piedon. Do kiam mi aŭdis tiun vorton « Bein », mi pensis pri tiu unu membro de la homa korpo aŭ de la korpo de iu besto.

Mi ekloĝis en Germanio. Mi iris al viandovendisto kaj aĉetis raguon. Li demandis al mi : « Wollen Sie ein Bein dazu ? » (ĉu plie vi volas « Bein » ?) Mi ektimis kaj imagis, ke li alportos tutan kruron de bovo aŭ bovino.... Mi tuj vidis tion en mia aĉetkorbo, en mia kuirejo, en mia kuirpoto... Ŝoko !!! Mi respondis : « NE ! ». Do mi ricevis nur raguon, sen « Bein » kaj iris hejmen por prepari mian manĝon. Tio okazis du aŭ trifoje. Okazis, ke mi volis aĉeti ion alian, do staris en la viandovendejo atendente mian vicon. Iam dum atendo mi aŭdis alian

personon, kiu aĉetis raguon. La vendisto demandis : « Ĉu vi plie volas Bein ? » kaj la persono respondis : « Jes ! » Mi rigardis kaj vidis, ke la aĉetanto ricevis oston, tre bongustan oston, kiu entenas mjelon. Tian oston mi tre ŝatas. Mi miregis... Mi aĉetis mian manĝaĵon kaj kuris al mia ĉambro, al mia vortaro. « Das Bein » = kruro, osto. Tion oni neniam diris al mi, nek instruis al mi. Poste mi lernis « Nasenbein » por naza osto, « Schlüsselbein » por « klaviklo », ktp. Do mi devis pligrandigi la signifrilatan vastecon de tiu vorto en mia kapo.

de : UEBERSETZUNG

Kompreneble mi studis, lernis tiun vorton, kun signifo : transiro de fontolingvo al cellingvo, traduko. Post jaroj mi ekloĝis en Germanio kaj promenis per biciklo tra la urbo Winterthur. Subite mia biciklo paneis. Mi devis iri al riparisto. Li demandis al mi : « Ist die Uebersetzung noch gut ? » Mi tute ne komprenis. Tio estas, ke mi komprenis : « Ĉu la traduko ankoraŭ estas bona ? » Kial do tiu bicikloriparisto parolas pri traduko ? Li plurfoje rediris sian demandon, tio ne helpis al mi. Li rediris ekzakte la saman frazon, sen sukceso. Poste li montris la centron de la malantaŭa rado, kie estas (fr) « transmission ». Tiam mi komprenis, ke la vorto « Uebersetzung » plie signifas « transmission », temas pri tiu mekanika transdono de energio.

jp : GASSHUKU

Dum mia kunlaboro kun mia aikido majstro mi devis organizi « Gasshuku ». Temas pri staĝo, kie la partoprenantoj kune manĝas kaj dormas en la sama loko, domo, tendumejo, aŭ simila. Li instruis al ni, ke « Gasshuku » estas kunveno, staĝo, kaj la fakto, ke ĉiuj manĝas la saman rizon kaj tranoktas sub la sama tegmento, altigas la kvaliton de la studado aŭ de la laboro. Kiam mi alvenis al Koreio kaj Japanio, mi aŭdis la vorton « Kunloĝado » kiel tradukon de gasshuku. Tio ne plaĉis al mi. Tio ne esprimas la signifon, kiun mi ricevis de mia japana majstro. Mi elektis tiun temon dum tritaga intensa studado en Kameoka ĉe Oomoto fine de 2008 (Transjara kurskunveno). Mi klarigis : « Se mi iras al hotelo kun mia amanto, tio estas kunloĝado ; ĉu tio estas Gasshuku ? » La ŝokitaj gestudentoj kriis : « NE !! » Do la vorto kunloĝado ne havas la saman signifon, la saman signifrilatan vastecon. Mi proponis, ke ni kune serĉu, esploru, pri pli taŭga, adekvata esprimo. Finfine ni trovis du : « Studcela kunloĝado » aŭ « Laborcela kunloĝado ». Do la vorto kunloĝado ne tute esprimas la enhavon de Gasshuku.

Jen ekzemplo : en Ĝenevo Japanio havas mision ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kiel ĉiuj ŝtatoj de la mondo. Tie laboras oficistoj, diplomatoj, dum la tuta jaro. Ili loĝas tie kun gefamilianoj, iliaj infanoj frekventas lernejon en la urbo Ĝenevo. Se okazas ia konferenco ĉe UN, venas pliaj diplomatoj el Tokyo. Ili venas por du-tri semajnoj, sen gefamilianoj. Por la daŭro de la konferenco la japana registaro luas tutan etaĝon en iu hotelo en Ĝenevo kaj tie okazigas Gasshuku ; tio estas, ke la japanaj oficistoj de la japana misio en Ĝenevo devas forlasi sian familion kaj ekloĝi en la de Tokyo elektita hotelo kun siaj kolegoj el Tokyo. Dum la tuta konferenco ili laboras kune, manĝas kune, dormas en la sama hotelo kaj ne rajtas iri hejmen. Tio estas japana labormaniero.

DEMOCRATIO

Dum miaj vojaĝoj mi povis konstati, ke la signifo de tiu vorto ege malsimilas de lando al lando, de kulturo al kulturo. Iu diris al mi, ke en Ĉinio demokratio signifas manĝaĵoj por ĉiuj. Iu diris al mi, ke en islamaj landoj oni ŝokiĝas vidante la okcidentajn junulinojn kun nuda ombiliko pro mallarĝa brusta vesteto kaj mallonga pantalona surventra parto, do en islamaj

landoj oni ne volas tiajn junulinojn kiel en demokrataj okcidentaj landoj, do homoj tie venas al la konvinko, ke demokratio estas nuda ombiliko por junulinoj....

fr FRERE, SŒUR

En mia regiono oni nomas fraton tiun, kiu havas la saman patron kaj la saman patrino. Se estas nur la sama patro aŭ nur la sama patrino, tiam oni diras « demi-frère » aŭ « demi-sœur ». En Afriko ia proksima persono, eĉ ne ankoraŭ amiko, estas nomata « frère » aŭ « sœur ». En la momento de konatiĝo eĉ tiam oni aŭdas : jen mia frato ! Do eŭropanoj ne bone komprenas afrikanojn, ili pensas, ke afrikanoj havas gigantajn familiojn, ĉar ili daŭre komprenas la vortojn laŭ eŭropa semantika kampo. Tamen en Afriko la signifrilata vasteco de tiuj vortoj ne estas la sama. Se afrikano havas fraton aŭ fratino, kies patro kaj patrino estas la samaj, tiam oni diras tion klare : ni havas la saman patron kaj la saman patrino. Plej mallonge mi aŭdis « même père même mère ». Tie kulturo ludas rolon.

eo kaj fr : KOMPLICO

Mi komprenas tiun vorton senprobleme, ĉar ĝi devenas el la franca « Complice ». Tamen la semantikaj kampoj de la vorto en la du lingvoj ne samas. En eo la signifo estas « kunkulpulo » kaj nur tio. Do en eo la signifo estas nur negativa. En la franca la vorto « complicité » povas esti ankaŭ pozitiva. Jen ekzemplo : « la complicité féminine » estas (post vasta enketo ĉe franclingvanoj) « intervirina kunsentemo » aŭ « intervirina solidareco », eble. Temas pri tute pozitiva afero. « Regards complices », solidaraj interrigardoj... Mi tre bedaŭras, ke mi devas esplori pri aliaj vortoj kaj devas rezigni pri la uzo de la vorto Kompliko, kiu estas nur negativa en eo.

fr « POUFFIASSE »

Temas pri slanga vorto. Pro tio mi metis « .. ». En mia regiono ĝi uzatis kaj uzatas. Mi ne esploris, ĝis kie ĝi estas uzata, ĉu nur en mia kantono, ĉu nur en Romandio, ĉu ankaŭ en Francio. Ĝi ĉiam rilatas al virino. En mia junaĝo ĝi havis signifon de dika virino. Foje tute hazarde mi uzis tiun vorton parolante kun miaj filinoj, kiuj estas proks 30 jarojn malpli aĝaj ol mi. Ili ŝokiĝis, ĉar por ili tiu vorto signifas putino. Do tra la jaroj la signifrilata vasteco evoluis. Pri slango vortoj aperas kaj malaperas rapide.

Malsamaj aspektoj en la prezentitaj kazoj

En la kazo de BEIN kaj de UEBERSETZUNG okazis, ke la instruisto donis nur parton de la signifrilata vasteco de la vortoj. Posta adaptiĝo estis malfacila kaj voris energion.

En la kazo de GASSHUKU okazis miso, fuŝo, okaze de traduko. La proponita formo en eo estis mankohava, ne kongrua, nur parta. Oni solvis la aferon per aldono, preciziga aldono en adjektiva formo.

En la kazo de DEMOKRATIO kaj FRERE ; SŒUR, ni estas en kultura problemo : la signifrilata vasteco de la vorto ŝanĝiĝas, kiam oni saltas de unu kulturo al alia kulturo, eĉ se la uzata lingvo estas la sama. Per vastskale uzata lingvo kiel la franca, tia situacio oftas. Mi povas imagi, ke samaj fenomenoj okazas en la uzo de la angla, rusa, hispana, ktp.

En la kazo de KOMPLICO problemo naskiĝas pro la fakto, ke francparolanto aŭtomate kaj senkonscie kunportas la signifrilatan vastecon de tiu konata vorto el la franca al esperanto kaj tion li aŭ ŝi ne devus fari. Granda simileco de KOMPLICO kun COMPLICE gvidas al tio, misgvidas la esperanto-studenton.

En la kazo de POUFFIASSE ni estas en malalta lingvonivelo, slango, kiu estas en konstanta kaj rapida evoluo kaj la ŝanĝo, kiun mi priskribis, okazis laŭ la tempa akso. Ni estas en diakrona evoluo.

Pedagogiaj aspektoj

Mi povis observi, kio okazis al mi pri tiu vorto BEIN. Mi penis lerni la signifon BEIN = OSTO. Mi devis larĝigi la signifrilatan vastecon de tiu vorto en mia menso. Tio postulis grandan energion de mi. Tiu ŝanĝo estis malfacila kaj longdaŭra.

Pro tio kiel instruisto mi alvenis al la konkludo, ke tion oni devas nepre eviti. Konsekvence mi instruis samtempe kaj la signifon KRURO kaj la signifon OSTO por BEIN.

Kompreneble tio estas pli malfacila paŝo por la lernantoj. Ili ŝatus lerni BEIN egalas KRURO kaj punkto fino. Same ili trovas nur unu signifon uzante elektronikan vortaron. Tiam ili sentas facilecon kaj havas la impreson, ke ili majstras la aferon. Per dedukto ili plie diros, ke la instruisto estas bona instruisto. Sed iam kiam ili malkovros la kompletan vastecon de la signifo de la vorto, ili eble havos dubon pri la kapabloj de sia instruisto, kaj konsekvence ekdubos pri ĉio, kion li aŭ ŝi diris. Tio nepre ne devas okazi. La instruisto ne rajtas simpligi la lingvon, la studobjekton. La instruisto devas prezenti la realan aspekton, la kompletan aspekton de la studobjekto, eĉ se tiu estas kompleksa, malfacila, diversaspekta.

Konkludo

La aspekto de signifrilata vasteco estas gravega fenomeno en la komunikado. Iu klarigis (mi citas laŭmemore) : Estas en via menso ideo, jam viaj vortoj malsimilas je ĝi, jam la vortoj aŭdataj de mi malsimilas je la vortoj diritaj de vi, kaj poste la ideo, kiu naskiĝas en mia menso ege malsimilas je la vortoj, kiujn mi aŭdis, kaptis. Fina rezulto : la ideo de la parolanto ne tute, ne komplete, ne perfekte atingas la menson de la aŭskultanto. La paneoj ĉirkaŭ tio estas ne nur afero de signifrilata vasteco; estas ankaŭ aferoj de vortelekto, de prononco, de frazostrukturo, de klara sinesprimo, de konotacio, de karismo aŭ manko je karismo, de emociaj aspektoj, de atento aŭ ne atento, de ĉirkaŭaj bruoj aŭ silento, ktp...

Feliĉe esperantistoj havas komunan lingvon por paroli pri tiaj aspektoj kaj precizigi tion, kio bezonas precizigon.

Bibliografio

Boysson-Bardies « Le langage, qu'est-ce que c'est ? » Eldonejo Odile Jacob, 2003

Garino Claude « Les Mots » Eldonejo IDEA 2002

Gauthier Guy « Langues : une guerre à mort » Eldonejo Corlet Marianne, 2000

Mahmoudian Mortéza « La Linguistique » Eldonejo Seghers, 1982

Mounin Georges « Clefs pour la linguistique », Eldonejo Seghers, 1987

Taylor Alex « Bouche bée, tout ouïe » Eldonejo Points, 2010

Wennergren Bertilo « Detala Gramatiko de Esperanto » ILEI, E@I, 2010

Wennergren Bertilo « Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko » ELNA, 2005

